

informilo por interlingvistoj



Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj

21-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 83 (4/2012)

Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj.....	1
1.1	“Socilingvistika Simpozio 19” – Invented Cities: La resumo (Humphrey Tonkin)	1
1.2	Universala Esperanto-Asocio organizis seminarion pri Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO (Humphrey Tonkin).....	3
1.3	Simpozio pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj (Humphrey Tonkin)	3
1.4	22-a konferenco de <i>Societo pri Interlingvistiko (GIL)</i> en Berlino.....	5
1.5	Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko – <i>KAEST 2012</i>	7
2	Scienca konferenco pri Ekonomi(k)o de lingva politiko 2013.....	8
3	El universitatoj kaj altlernejoj	9
3.1	Nova studjaro en Poznano (Ilona Koutny).....	9
3.2	Interlingvistiko en Ukrainio (Nina Daniljuk)	10
3.3	Doktoriga disertacio pri la “interna ideo” de Esperanto de <i>Christian Lavarenne</i>	10
3.4	Master-laboraĵo de <i>Marzena Antas</i>	10
3.5	Universitato de Amsterdamo: serĉatas profesoro pri interlingvistiko	11
3.6	Universitatnivelaĵoj en la reto.....	11
3.6.1	Komputiko	11
3.6.2	Interlingvistiko.....	11
4	Aktoj de la 31-a esperantologia konferenco (2008).....	12
5	Aktoj de <i>Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)</i>	13
5.1	La aktoj de la 20-a konferenco de GIL 2010	13
5.2	La aktoj de la 21-a konferenco de GIL 2011	14
6	Novaj libroj	15
6.1	En la germana – la 14-a traduko de la <i>Zamenhofstrato</i>	15
6.2	<i>Max Hans-Jürgen Mattusch</i> pri la multlingveco kaj ties estonteco	15
6.3	Pri lingvo-inventado (<i>Stephen Rogers, Michael Adams</i>)	16
6.4	En „Planet Word“ de <i>John Paul Davidson</i> pri planlingvoj.....	16
6.5	Premiitaj eseoj pri Esperanto-Literaturo (<i>M. Lipari/H. Tonkin</i>)	16
6.6	En festlibroj: Kontribuoj de <i>Johannes Klare</i> kaj <i>Nikolaos Trunte</i>	17
6.7	Pri Esperanto-literaturo en <i>Metzler Lexikon Avantgarde</i>	18
6.8	Evoluigi komprenon pri lingvoj per <i>Springboard to Languages (Angela Tellier)</i>	18
6.9	<i>Probal Daşgupta</i> : Esperanto kiel interleksika glosilo	18
6.10.	<i>Federico Gobbo</i> kaj <i>Marco Benini</i> pri konstruiva lingvistiko	18
6.11	Wiki-Librooj pri interlingvistiko kaj Esperanto – stranga mikso.....	19
7	Multilingual Europe – Multilingual Europeans (<i>László Marácz/Mireille Rosello</i>)	20
8	ESF investas en la retaj sukcesoj de Esperanto	21
9	Leksikografio	
9.1	<i>Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto</i> en la reto	22
9.2	Aliaj vortaroj en la reto.....	22
9.3	La nova <i>Esperanta Bildvortaro</i> (Detlev Blanke)	22
9.4	Fakvortaro pri biologio en Interlingua kaj la angla	23
10	Revuoj.....	23
10.1	Nova revuo: <i>Lingvistik</i>	23
10.2	<i>Scienca Revuo</i> kun nova koncepto (Johannes Mueller).....	23

1 Pasintaj aranĝoj

1.1 „Sociolingvistika Simpozio 19“ – Invented Cities: La resumo

En IpI 82 (3/2012), p. 1, ni raportis pri la internacia simpozio kun la angla nomo „Sociolinguistics Symposium 19“ (en Freie Universität/Libera Universitato, Berlino). Tie ankaŭ prelegis *prof. Humphrey Tonkin* pri la temo

„*Invented Cities; Invented Languages: Esperanto and Urban Textuality 1887 – 1914*“.

Jen sekvas lia anglalingva resumo:

In a 1905 letter to Alfred Michaux, L. L. Zamenhof, author of Esperanto (1887), seems to locate the origins of Esperanto in the multilingual environment of his native city, Bialystok, then in Russia, now in Poland. Divided by language, the four ethnic groups in the city were constantly at odds. A common language, Zamenhof seemed to suggest, could have brought them together.

Esperanto owed its early popularity to the emergence of an urban middle class nurtured by universal education and imbued with cosmopolitanism. Members of this class, linked by a new language, had the money and leisure to look beyond their own communities. They were endowed with faith in technological progress and a corresponding belief in the achievement of common values manifest in such phenomena as universal expositions and early international organizations (the Red Cross, the Universal Postal Union, the International Telegraph Union...). Zamenhof's success came from his realization that Esperanto was not simply a language, but a textual community.

In his book *Reading Berlin* (1996), Peter Fritzsche¹ has argued that the modern city came into being through shared text: „In an age of urban mass literacy, the city as place and the city as text defined each other in mutually constitutive ways.“ Berlin, Vienna, London, Paris created a sense of themselves constantly reinforced by the popular press, whose texts became mirrors of these cities' identity. Esperanto began as an inter-urban self-reinforcing agglomeration of written texts, shared and held in common, linking its followers through periodicals, printed books, and above all by correspondence. This linguistic experiment was therefore also a social experiment, seeking common values in the shared experience of the cities of Europe and the imagined community that they represented. The expansion of Esperanto in the early 1900s was driven primarily by belief in its value to commerce and science. Increased middle-class mobility in due course made it a spoken as well as a written language. The first world Esperanto congress was held in 1905; subsequently, such congresses were held annually in different cities across Europe.

The virtual community that Esperanto texts created helped reinforce a common ideology of peace and internationalism, overlaid on the immediately practical goal of promoting commerce, and leading to the emergence of a universalist identity situated in an emergent common language.

A careful reading of Zamenhof's letter leads the reader to the conclusion that Zamenhof saw the fundamental problem in Bialystok not as ethnic division but as anti-Semitism. Recent biographies of Zamenhof by Korzhenkov (Homarano, 2nd ed. 2011) and Künzli (L. L. Zamenhof: Esperanto, Hillelismus und die jüdische Frage, 2010) stress the parallels between Zamenhof's experiments with language and his search for a kind of post-Zionist universalism. This less evident, yet urgent, agenda created a marked tension between what we might call the utilitarian goals of collaboration in commerce and science, and the idealistic goals of the brotherhood and sisterhood of all.

¹ Fritzsche, Peter (1998): *Reading Berlin 1900*. Cambridge (Mass/USA): Harvard University Press, 320 p.

1.2 Universala Esperanto-Asocio organizis seminarion pri Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko

Hanojo, Vjetnamio. La 97-a Universala Kongreso de Esperanto, organizita de Universala Esperanto-Asocio en Hanojo, Vjetnamio, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, estis la loko de seminario (en Esperanto) pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. La seminario, sub gvido de *Humphrey Tonkin* kaj *Neil Blonstein*, reprezentantoj de UEA ĉe la ĉefsidejo de UN en Novjorko, kaj *Renée Triolle*, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, donis superrigardon pri la strukturo de la du organizaĵoj, kaj precipe de iliaj humanecaj kaj homrajtaj agadoj. La celo de la seminario estis prezento de la UN antaŭ la Esperanto-komunumo. Kvardeko da homoj partoprenis, el larĝa gamo de landoj kaj profesioj, inkluzive instruistojn. Materialoj el la seminario estas konsulteblaj en la retpaĝaro de Esperanto por UN, www.esperanto-un.org, kie troviĝas ankaŭ Esperanto-tradukoj de gravaj dokumentoj de UN, kune kun terminaro pri UN kaj priskribo de la strukturo de UN. (*Humphrey Tonkin*)

1.3 Simpozio pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj

En IpI 81 (2/2012), p.6-8, ni prezentis la anglalingvan programon de lingvopolitika konferenco, kiu komence de majo 2012 okazis en la sidejo de UN en New York. Sekvas nun la esperantlingva raporto pri tiu ĉi grava aranĝo. (Red.)

Raporto kaj resumo de *Humphrey Tonkin*

Mardon la 1-an de majo 2012, ĉe 777 United Nations Plaza, New York, Usono, *Universala Esperanto-Asocio*, kunlabore kun *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj* kaj la faka revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado), organizis simpozion pri “Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj.” Oni anoncis la simpozion kiel “superrigardon kaj esploron de la efiko de lingvoj ĉe la laboro de la familio de Unuiĝintaj Nacioj.” Ĝi arigis kontribuojn de vasta gamo de profesiuloj kaj universitatanoj.

Laboro super la simpozio komenciĝis unu jaron pli frue, en 2011.

La 15-an de decembro, la Asocio organizis preparan konsultiĝon pri la sama temo, kiun ĉeestis kvardeko da homoj, interalie reprezentantoj de Neregistaraj Organizaĵoj, homoj ligitaj al UN, kaj universitatanoj. En la aranĝo de 15-a decembro, *Profesoro Humphrey Tonkin*, de la Universitato de Hartford, Connecticut, prezentis referaĵon kun titolo “Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj,” kiu donis superrigardon de lingva politiko ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj en la diversaj organizaĵoj de la UN-familio. Tiun referaĵon sekvis podiskuto inter *Françoise Cestac*, iama Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri Konferencaj Servoj, *Roberto Borrera*, de la UN-Forumo pri Indiĝenaj Demandoj, kaj *Paolo Valore*, profesoro pri filozofio de la Universitato de Milano, Italio, kaj gastprofesoro ĉe la Novjorka Universitato. Post reverko, la referaĵo cirkulis inter homoj interesataj pri la temo. Pluraj el ili ĉeestis la simpozion de la 1-a de majo 2012.

La aranĝon de la 1-a de majo ĉeestis preskaŭ 100 homoj, inter ili ambasadoroj, funkciuloj de UN, universitatanoj, kaj reprezentantoj de NROj. La simpozio okupis unu tutan tagon ekde la 10-a matene ĝis la 17-a vespere, post kio sekvis akcepto por la partoprenantoj.

La unua sesio konsistis el rimarkoj de Ambasadoro *Filippe Savadogo*, Konstanta Reprezentanto de La Frankofonio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj *Alassane Diatta*, Estro de la Franclinga Traduka Servo, kiu reprezentis la Fakon de Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj de Konferencoj. Parolante france, *Ambasadoro Savadogo* emfazis la gravecon de

konservo de politiko de multlingvismo ĉe UN. *D-ro Diatta* donis superrigardon de la laboro de sia fako, substrekante la esencan valoron de efikaj interpretado kaj tradukado en la bona funkciado de la tuta organizaĵo.

Sekvis je 10:30 sesio pri lingva politiko ĉe Unuiĝintaj Nacioj, sub prezido de *Françoise Cestac*, iama Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri Konferencaj Servoj. Ĝi konsistis el du referaĵoj, el kiuj la unua estis de *Marie-Josée de Saint Robert*, Estro de la Lingva Servo en la Fako pri Konferenca Mastrumado ĉe UN-Ĝenevo. Pro ŝia neĉeesto, ŝia referaĵo, “Politiko rilate lingvouzon en Unuiĝintaj Nacioj”, estis legata de *Profesoro Bonnibeth Fonseca-Greber*, de la Universitato de Louisville. Sekvis referaĵo de *André Corrêa d’Almeida* kaj *G. Bahar Otcu* (Universitato Columbia) pri “La portugala lingvo en Unuiĝintaj Nacioj,” prezento de la statuso de la portugala lingvo en UN kaj argumentoj por ĝia oficialigo.

La posta sesio, je 11:30, pretersaltis Unuiĝintajn Naciojn por trakti la pli vastan lingvopolitikan situacion tra la mondo, sub la titolo “La lingvopolitika fono kaj ĝiaj implicoj.” Tri referaĵoj esploris la rolon de iamaj koloniaj lingvoj en la evoluprocedo, lingvan morton fronte al modernigo kaj tutmondigo, kaj registarajn lingvojn en multlingvaj situacioj. Ĉiu referaĵo traktis apartan kontinenton: Afrikon, Sudamerikon, Azion. *Clément Mbom*, de la Urba Universitato de Novjorko (CUNY), ekzamenis la tutmondan etendiĝon de la franca lingvo, precipe en Afriko, en “Lingvoj kaj homa evoluigo: La franca lingvo, aganto por evoluigo en la landoj, kie ĝi ne estas patrina lingvo.” *Profesoron Mbom* sekvis *Anna Luisa Daigneault*, de la Instituto por Lingvoj en Danĝero “Vivantaj Idiomoj,” kiu esploris la temon “Lingvoj de Sudameriko en danĝero: Desuba lingva aktivismo kaj novaj medioj por la 21-a jarcento,” kaj *Lauren Zentz*, de la Universitato de Arizono, kiu pridiskutis diglosion en la indonezia kunteksto en sia referaĵo “Heredaĵoj de moderneco, postkolonieco, tutmondiĝo: Lingva politiko en Indonezio.”

Tiuj ĉi referaĵoj gvidis la ĉeestantojn logike al dokumenta filmo montrita dum la lunĉa paŭzo, „Languages Lost and Found: Speaking and Whistling the Mamma Tongue“ (Lingvoj perditaj kaj trovitaj: Paroli kaj fajfi la panjan lingvon), kreita de *Iris Brooks* kaj *Jon H. Davis*, de Northern Lights Studio, kiuj prezentis la filmon kaj pridiskutis ĝian enhavon.

Post la lunĉo, la temo “La lingvopolitika fono kaj ĝiaj implicoj” estis ree traktita en referaĵo de *Timothy Reagan*, fakulo pri eduka politiko kaj profesoro ĉe la Ŝtata Universitato de Centra Konektikuto (CCSU), kiu prenis iom novan pozicion rilate la demandon de patrinlingva edukado, tiu eduka idealo subtenata de Unesko, pridemandante la konceptojn de patrina lingvo kaj denaska lingvo en la fluida lingva kunteksto de la evoluanta mondo. Li pridiskutis la malfacilecon difini kaj liveri patrinlingvan edukadon en “Sed kio estas mia patrina lingvo? Rekoncepti la defiojn de patrinlingva edukado.” Post tiu prezento, *Myriam de Beaulieu*, tradukisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, parolis pri “Perdo de leksika kaj kultura diverseco en tutmonda komunikado,” esplorante la rapidiĝon de lingvaj pruntoj el la angla al la franca.

Poste sekvis larĝa diskuto inter la prezentantoj en la du antaŭaj sesioj kaj kun la ĉeestantaro.

La sesio de 15:00, pri “Lingva instruado kaj lernado,” enhavis tri referaĵojn. La unua, de *Bonnibeth Fonseca-Greber*, de la Universitato de Louisville, “Preparante la venontan UN-generacion: Profesia evoluiga plano por kandidatoj kiel tradukistoj,” priskribis universitatan tradukinstruan programon direktitan al la bezonoj de UN. *Miriam Eisenstein Ebsworth* kaj *Brianna Avenia-Tapper*, de la Novjorka Universitato, *Patricia Duffy*, de la Programo de UN pri Lingvo kaj Komunikado, kaj *Jill Kalotay*, retpaĝestro kaj konsultisto, prezentis komunan referaĵon pri “Lernado de la angla por paco: Reta anglalingva kurso pri UN,” kaj *Sohair*

Soukkary, de la Kolegio Baruch, CUNY, en “Lingvoinstruado: Spilante la rektan flankon de la cerbo,” priskribis siajn spertojn en instruado de la araba.

Fina sesio, pri “La sperto NRO,” konsistis el prezentoj de la Legio de Bona Volo (*Danilo Parmegiani*) kaj Universala Esperanto-Asocio (*d-ro Steven Brewer*), kiuj priskribis la laboron de tiuj organizaĵoj en multilingva kunteksto, kaj iliajn alirojn al antaŭenigo de kompreniĝo trans lingvaj baroj.

Fermajn rimarkojn liveris *Profesoro Humphrey Tonkin*, de la Universitato de Hartford, kiu notis la kreskantan nivelon de interesiĝo pri la implicoj de la lingva situacio en Unuiĝintaj Nacioj kaj emfazis al la partoprenantoj la gravecon de serioza scienca studado de la lingvaj praktikoj de UN; kaj *Françoise Cestac*, kiu memorigis la ĉeestantojn pri la rolo, kiun ludis tra la jaroj la kunvokantoj de la nuna simpozio en atentigo pri la graveco de tia studado. Profesoro Tonkin krome proponis starigon de konstanta laborgrupo de homoj interesataj pri la temo.

La riĉa kaj abunda programo de la simpozio rezultigis stimulaĵojn inter prezentantoj de referaĵoj kaj aliaj partoprenantoj, sed restis ĝenerala konscio, ke tempo mankis por plene trakti la temon, tiel ke nepris daŭrigi la diskuton, precipe pri tiuj partoj de la programo, kiuj rilatas rekte al UN. Oni interkonsentis, ke necesas trovi mekanismojn por daŭrigi la diskuton, precipe por ekzameni kelkajn aparte gravajn demandojn, kiel ekzemple la konservado de multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, la rilato inter la laborlingvoj de la Organizaĵo, kaj la improvizitaj aranĝoj utiligataj fronte al neceso, precipe sur terenoj kaj en situacioj for de la sidejo de UN kaj la funkciado de formala lingva politiko.

(Ekzistas la plano, publikigi la aktojn – Red.).

1.4 22-a konferenco de la *Societo pri Interlingvistiko (GIL) en Berlin*

La germana scienca societo „Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL) (Societo pri Interlingvistiko), ekde 2011 sub gvido de la nova prezidantino *prof. d-rino Sabine Fiedler* (anglistino en la Universitato de Leipzig)² daŭrigis sian celkonscian agadon aranĝante la jam 22-an konferencon. Ĝi okazis de 23-a ĝis 25a de novembro 2012 en Berlin. La faka programo traktis la ĉeftemon „Ideo-historiaj aspektoj de planlingvoj“.

Oni prezentis jenajn germanlingvajn prelegojn:

D-ro Cyril Brosch (Universitato Würzburg/Germanio)

Die Haltung der Indogermanistik zur Plansprachenfrage (La sinteno de hindoĝermanistiko pri la planlingva problemoj)

Prof. d-ro KIMURA Goro Christoph (Sophia-Universitato Tokio)

Hat Esperanto eine interne Idee? (Ĉu Esperanto havas internan ideon?)

Prof. d-ro Velimir Piškorec (Universitato de Zagrebo)

Inter- und Ökolingvistik im Vergleich: Ansätze, Traditionen, Schnittstellen (Interlingvistiko kaj ekolingvistiko en komparo: vidpunktoj, tradicioj kaj intersimilaĵoj)

² Detlev Blanke iniciatis kaj kunfondis la societeton en 1991 kaj post 20-jara prezido ne rekandidatiĝis. Li elektiĝis honora prezidanto kaj daŭre redaktos la germanan bultenon de GIL „Interlinguistische Informationen“ (Interlingvistikaj Informoj), kiu enhave – eble 70-procente – similas al IpI.

Inĝ. Toon Witkam (Utrecht, Nederlando)

Plansprachen – zukunftsgerichtliche Aspekte für das 21. Jahrhundert (planlingvoj – futur-historiaj aspektoj por la 21-a jarcento)

Prof. D-ro Bengt-Arne Wickström (Humboldt-Universitato de Berlino)

Ökonomie in der Sprache (mit Beispielen aus dem Esperanto und Tok Pisin) (Ekonomio en la lingvo – kun ekzemploj el Esperanto kaj Tok Pisin)³

D-ro László Marác (Universitato Amsterdamo)

János Bolyai und das Ungarische als perfekte Sprache (János Bolyai kaj la hungara kiel perfekta lingvo)

Louis von Wunsch-Rolshoven (Berlino)

Die Verbreitung von Ideen entsprechend dem Modell „Diffusion of Innovations“ (Everett Rogers) (La disvastigo de ideoj laŭ la modelo „disvastigo de novaĵoj“ de Everett Rogers)

Prof. D-ro Heiner Eichner (Universitato Vieno)

Zur Idee der optimierten internationalen Plansprache aus sprachwissenschaftlicher Sicht (unter Berücksichtigung von Rask, Linguaŝ universale; Schleyer, Volapük; und vor allem: Zamenhof, Lingvo Internacia = Esperanto) (Pri la ideo de optimumigita internacia planlingvo laŭ lingvistika vidpunkto – kun konsidero de Linguaŝ universale de Rask, Volapuko de Schleyer kaj aparte Lingvo Internacia de Zamenhof)

Helen Geyer (Studentino, Universitato Leipzig)

Sprachpolitik und Praxis in Andorra (Lingvopolitiko kaj praktiko en Andoro)

Dro. Johannes Mueller (Ludwigsburg/Germanio)

Das neue Konzept der „Scienca Revuo“ (La nova koncepto de „Scienca Revuo“)

Prof. Dr. Sabine Fiedler (Universitato Leipzig)

Zum Projekt eines Häufigkeitwörterbuchs Esperanto (Pri la projekto de frekencvortaro de Esperanto)

Prof. Fiedler kaj Prof. Kimura prezentis *novajn fakverkojn* laŭ interlingvistika aspekto.

Johann Pachter kaj d-ro Detlev Blanke (ambaŭ Berlino) enkondukis diskuton pri la temo *Bibliotekoj kaj arkivoj*.

Kiel kutime *Johann Pachter* prezentis sian riĉan libroservon. *Detlev Blanke* aranĝis ekspozicion kun nova faka literaturo. *Sebastian Kirf* registris la tutan aranĝon vidbende (eblas mendi la dvd-ojn ĉe : ePost@Kirf.de).

La konferencon partoprenis 45 personoj, inter ili el Aŭstrio, Belgio, Italio, Japanio, Kroatio, Nederlando kaj Svisio. *Sebastian Kirf*, scienca kunlaboranto por integriĝinta lernado kaj media pedagogio kaj instrukomisiito por Esperanto en la Altlernejo Emden/Leer/Germanio, certigis la partoprenon de 6 studentoj en la konferenco.

Cetere: GIL estas malferma al ĉiuj homoj, kiuj estas interesitaj pri interlingvistiko kaj kapablas uzi la germanan lingvon. Pri aliĝoj decidus la Estraro. Vidu: www-interlinguistik-gil.de.

³ Tok Pisin estas kreola lingvo (iam nomata Pidgin English), parolata en la variantoj Novgvinea-Piĝino, Melanezia Piĝino kaj Novmelanezia Piĝino. Ĝi estas la ĉefa komunikilo en Papuo-Novgvineo.

1.5 Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko – KAEST 2012

Jam la duan fojon konferenco el la fama KAEST-serio okazis en la slovaka urbo Modra Harmónia (ĉe Bratislava). Ĝin ĉefe organizis la teamo kun Peter Baláž.

De 15.-18.11.2012 pli ol 50 personoj el 12 landoj aŭskultis kaj diskutis jenajn prelegojn:

Baláž, Peter

- *Plej freŝaj aktivecoj de E@I en la kampo de edukado*
- *Moderna edukado – ĉu tempo por ŝanĝo de paradigmoj?*

Blahuš, Marek

- *Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj*
- *Vikipedio – kiel funkcias la libera enciklopedio*

Chrdle, Petr

- *Specifaj trajtoj de instruado de Esperanto al triaĝuloj*

Demeyere, Bart

- *ViVo: Reta serĉilo en 10 diversaj vortaroj*
- *Kono: la plej efika maniero por parkerigi kaj konservi vian konon ĉe kono.be*

Dvořáková, Pavla

- *Terapiaj eblecoj de la muziko kaj de la sono en la kleriga procezo*

Feifičová, Magdaléna

- *BEK-umado*
- *Muzaiko*

Hruška, Miroslav

- *Aktuale pri fervoja konkurenco en Ĉeĥio*
- *Duolingo - nova interreta lernilo de lingvoj*

Kóródy, Zsófia

- *Lingvoinstruado ne (nur) per kredo*
- *Prezentado de la ICH-biblioteko*

Kováts, Katalin

- *RITE kaj LIBERAJ STUDIOJ ĉe www.edukado.net: kompleksaj retaj kursoj kaj studebloj (teleprelego)*

MacGill, Stefan

- *Superrigardo de kurso e125*

Malovec, Miroslav

- *Problemoj de pedagogia terminaro*

Marček, Stano

- *"Esperanto per rekta metodo" en 32 lingvoj*
- *Ĉu vi ŝatas fungojn?*

Markovo, Vinko

- *La eduka rolo de SAT*

Matúšov, Michal

- *Vikimedia Esperanto*
- *KantarVikio - centra Esperanta kantaro*
- *Esperanta muziko hodiaŭ*

Mueller, Johannes

- *Scienca Revuo*

Nosková, Katarína

- *Lingvolernado per modernaj interretaj teknologioj: specifecoj, avantaĝoj kaj tiklaj punktoj*

Petrović, Radojica

- *Aplikoj de la lernmastruma sistemo Moodle en ĉeesta kaj malĉeesta lernado kaj instruado*

Reinart, Jozef

- *Gravaj atingoj de EEU en la kampo de civitanaj iniciatoj - Triesta konferenco*

Szilvási, László

- *Esperanto-lernejo ĉe "Eventoj" en Budapeŝto: rekordoj kaj metodoj...*

Tikhomirov, Konstantin

- *Slavaj lingvoj*
- *Skribsistemoj*
- *Onomatopeoj kaj interjekcioj en Esperanto*

Tišljar, Zlatko

- *Modernaj aspektoj de malnova metodo instrui Esperanton. La Zagreba Metodo*

Vajs, Ján

- *Cenotoj – misteraj grotoj de Majaoj*

Vergara, José Antonio

- *Senco kaj estunteco de ISAE (Teleprelego)*

Zouzalík, Václav

- *Malmulte konataj projektoj de Fondaĵo Vikimedia*
- *La novslava lingvo*

(Laŭ <http://kaest.ikso.net/pmwiki/pmwiki.php?n=Main.Prelegoj>)

Oni planas publikigi la aktojn de la konferenco.

2 Scienca konferenco pri la Ekonomi(k)o de lingva politiko 2013

Kadre de la „Venice Summer Institute“ de CESifo *Bengt-Arne Wickström* kaj *Michele Gazzola* organizas internacian konferencon pri la “Ekonomi(k)o de lingva politiko” en Venecio la 26-an kaj 27-an de Julio 2013.

Proponoj por kontribuajtoj en la angla lingvo estas petataj de ekonomikistoj kaj esploristoj de aliaj fakoj laborantaj pri temoj rilataj al lingva politiko. Sekvas ne-kompleta listo de eblaj temoj por la individuaj kontribuoj:

- lingvo kaj ekonomika efikeco (ekzemple lingvoj en la labormerkato, lingvoj kiel publika bono, lingva diverseco kaj komerco, lingvoj kaj entreprenoj)
- lingva dinamiko kaj rete eksternaj efektoj
- lingvo kaj etna kaj sociala identecoj
- lingvo kaj ekonomika kaj socia potencoj
- taksado de la kostoj kaj distribuaj sekvoj de malsimilaj lingvopolitikoj
- normativa taksado de malsimilaj politikoj rilate al oficialaj lingvoj
- teknikoj por taksu la materian kaj simbolan valorojn de lingvoj (ekzemple iloj adaptitaj de media ekonomiko)

Provizora versio de la proponita laboraĵo akcepteblas. Ĉiujn proponojn oni devas fari pere de la hejmpaĝo de CESifo (vidu la adreson malsupre). La fina versio de akceptitaj laboraĵoj devas esti preta por dissendado al la partoprenantoj de la konferenco kaj al la diskutantoj kaj por enmeto en la konferencmaterialojn plej malfrue la 28-an de junio 2013.

Pliajn informojn oni trovas en la hejmpaĝo:

http://www.cesifo-group.de/ifoHome/events/academicconferences/details?iframeUrl=http://www.cesifo-group.de/portal/page/portal/mgnl/Conferences/_confDetailMGNL%3fpConfId=2929

3 El universitatoj kaj altlernejoj

3.1 Nova studjaro en Poznano

Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano/Pollando komenciĝis la 15-a studjaro: la dua studjaro de la 5-a grupo (16.-21.9.2012).

La partoprenantoj alvenis el jenaj landoj: Hungario, Svislando, Germanio, Rusio, triopo el Pollando kaj kvaropo el Brazilo.

Kiel kutime okazis 4 kursoj:

Věra Barandovská-Frank analizis kun la grupanoj la pli novajn planlingvajn projektojn enkadre de la interlingvistika kurso. Al la elstara kaj sindediĉa interlingvistino la grupo gratulis pro ŝia jubileo.

István Ertl (redaktoro de Beletra Almanako) prezentis la verkistojn kaj verkojn de la literaturo de la 3a periodo.

Michael Farris traktis semantikon kaj morfologion.

Ilona Koutny okupiĝis pri esperanta sintakso.

Post la merkredaj ekzamenoj dum la komuna vespero kelkaj partoprenantoj prezentis propran aŭ tradukitan verkon.

Semajnfine kiel kutime okazis la kultura renkontiĝo *Arkones* (jam la 28-a!), al kiu kontribuis la gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj: *Ivan Colling* (BR) per analizo de la rolo kaj influo de Kartezio (Descartes), *Guilherme Jardim* (BR) per prezento de Brazilo, *Mirejo Grosjean* (CH) interese traktis Afrikon, kie ŝi regule agas kaj *Anina Stecay* legis sian krimnovelon. Same la ĉeestantaj instruistoj kontribuis: *Zbigniew Galor* traktis kulturen ekskludon, *Istvan Ertl* raportis pri Beletra Almanako kaj *Ilona Koutny* prelegis pri (ne)eŭropeco de Esperanto.

Ĉiuj povis ĝui la aliajn abundajn kaj interesajn programojn.

Ilona Koutny

(<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>)

3.2 Interlingvistiko en Ukrainio

Ekde la septembro 2012 *d-rino Nina Daniljuk* estras la „katedron pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko“ en la Orienteuropa nacia universitato kun la nomo Lesja Ukrainka en la urbo Lucjk. En la studplano estas speciala kurso pri interlingvistiko kaj fakultativa kurso de Esperanto por la studentoj. Tio estas la rezulto de multjara laboro ĉi-flanke kaj de tio, ke mi havas oficialan diplomon pri finita 3-jara kurso pri interlingvistiko en la universitato de Poznano en Pollando. Nia katedro sekvontjare (la 20-21.09. 2013) organizos kune kun la katedro pri aplikata lingvistiko la sciencan konferencon „Interagado de la etnaj kaj planitaj lingvoj en la konteksto de la eŭropa integriĝo“ (en Lucjk kaj en Svitjazj). Ene de la konferenco okazos ronda tablo, dediĉita al Esperanto. Bonvolu sendi viajn proponojn rilate al tio. La prelegoj, kiujn preparos la partoprenantoj, estos publikigitaj en la scienca revuo de la universitato. (Nina_daniljuk@ukr.net)

3.3 Doktoriga disertacio pri la „interna ideo“ de Esoperanto de Christian Lavarenne

Christian Lavarenne (2012): *Espéranto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations (aide ou obstacle à la diffusion de la langue?)* Université Paris 13, UFR des Lettres, Sciences de l'Homme et des Sociétés. Gvidanto: Prof. Jean-Claude Lescure. 1687 p. (UFR = Unité de formation et de recherche).

Resumo de la disertacio

“*Esperanto: Ĝia Interna Ideo en siaj originoj kaj kelkaj el siaj esprimoj kaj manifestiĝoj (helpo aŭ obstaklo en la disvastigo de la lingvo ?)*”

Temas pri la ekzisto kaj rolo de la "Interna Ideo" de Esperant(ism)o, unue difinita kiel "frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj" (2-a UK, Genève, 1906), de (Ludoviko) Lazar Markoviĉ (aŭ Lejzer Motelev) ZAMENHOF.

La tezo studas la influon de la familia kaj socia origino (judeco), kaj poste de tolstoĵismo, sur la elpensanton de Esperanto, kiu unue revis pri fondo de hilelismo (laŭ la nomo de Hillel la Maljuna, samtempulo de Jesuo), kaj poste de homaranismo, "neŭtrala ponto inter la religioj" (kiel Esperanto volas esti neŭtrala ponto inter la lingvoj), ambaŭ rifuzitaj de la esperantistaro.

La malpli preciza interna ideo, ĝenerale akceptata, sorbe inkludis idealon de tolerema neŭtraleco kaj de paco; la lingvo estis proponata al la Ruĝa Kruco kaj servis en la sava gastigado de aŭstraj infanoj, ĉefe en Hispanio ; kaj la solidareco (Interhelpo de UEA) ebligis la forsavon de pluraj judaj esperantistoj (laŭ neeldonitaj korespondaĵoj).

Post la morto de Zamenhof (14-4-1917) la ideo, aparte memorigita en rilato kun lia naskiĝtago kaj liaj tombo en Varsovio kaj naskiĝurbo Byałyostok (UK-oj 1927, 31, 37, 59, 87, 2009), restis viva unue dank'al la Rondo(j) "Konkordo", ĉefe en Pollando ĉirkaŭ la familio Zamenhof (Klara, Leono, Felikso, Lidja). Intermilite en Francio la lingvo estis favore akceptata kaj subtenata – eble pere de reto de DREYFUS-defendantoj ĉirkaŭ Gaston MOCH kaj poste Paul PAINLEVE – de 42 anoj de la Scienca Akademio. Esperanto disvastiĝetis ĉe Libervola Civila Helpservo Internacia ktp.

Malgraŭ strangajetoj (himno, verdaj flago kaj steloj...) kiuj eble repuŝis neesperantistojn, kelkaj ĵuroj "reunigi la homaron" estis garantio, se ne ĉiam de progreso, almenaŭ de daŭro.

3.4 Master-laboraĵo de Marzena Antas

Antas, Marzena (2012): *Analiza postaw wobec języka angielskiego i języka esperanto w kontekście polityki językowej Unii Europejskiej.* Poznań: Universitato Adam Mickiewicz, Lingvistika Instituto. Gvidis: Prof. Ilona Koutny, 131 p.

(Analizo de la sintenoj al la angla kaj Esperanto en la kunteksto de la lingvo-politiko de Eŭropa Unio).

3.5 Universitato de Amsterdamo: serĉatas profesoro pri interlingvistiko

Laŭ informoj de *Wim Jansen*, la ĝisnuna profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, la universitato oficiale invitas sinproponojn por la fako, kiun prof. Jansen pro emeritiĝo forlasos somere 2013. Vidu:

www.uva.nl/over-de-uva/werken-bij-de-uva/vacatures/item/12-256.html

3.6 Universitatnivele kursoj en la reto

La „Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino“ (AIS) ofertas kelkajn kursojn en la reto, ĉefe en Esperanto, sed parte ankaŭ alilingvajn. Inter ili troviĝas:

3.6.1 Komputiko

Docento: *D-ro Reinhard Fössmeier*:

1. Enkonduko en la datenprilaboradon , Parto 1
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/edp1/2005/index.html>
2. Enkonduko en la datenprilaboradon , Parto 2
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/edp2/2005/index.html>
3. Enkonduko en la uzadon de la Interreto
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/interr1/index.htm>
4. Enkonduko al la teorio de strategiaj ludoj (Ludo-Teorio)
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/ludoteorio/index.html>
5. Komputila kodado de koloraj bildoj
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/koloroj/index.html>
6. Internaciigo (plurlingveco) de komputilaj programoj
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.de/kursoj/s1/multling/index.html>
7. Enkonduko al maŝina tradukado
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.de/kursoj/s1/mt/index.html>
8. Komputila sekureco: aŭtentikeco kaj konfidenceco
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/autkon/index.html>
9. Objektema programado per Ĝavo
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/java/index.html>
10. Enkonduko al Linukso
TTT-adreso: <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/linukso1/index.html>

3.6.2 Interlingvistiko

Docentino: *D-rino Věra Barandovská-Frank*:

1. Enkonduko en la interlingvistikon
TTT-adreso: <http://www2.cs.upb.de/extern/fb/2/Kyb.Paed/INT/index.html>

2. Akademioj, lingvoj kaj planlingvoj

TTT-adreso:

http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/AISKURSOJ/VBF/IKU2006_BARAN.pdf

3. La plej famaj verkoj de Erasmo de Roterdamo

TTT-adreso:

http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/AISKURSOJ/VBF/Erasmus_BARAN.pdf

4. Latinidaj planlingvoj

TTT-adreso:

http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/AISKURSOJ/VBF/Latinidaj_planlingvoj.pdf

5. Dialogo kaj interkompreno en interlingvistika laboro de Otto Jespersen

TTT-adreso: <http://w3.forst.wzw.tum.de/~quednau/AISKURSOJ/VBF/Jespersen.pdf>

Informoj pri AIS: <http://www.ais-sanmarino.org/index.html>.

4 Aktoj de la 31-a esperantologia konferenco (2008)

Ĝis jarfino 2012 aperos la aktoj el la jaro 2008:

Blanke, Detlev (2012, Red.): *Esperanto kaj aliaj lingvoj – kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj. Aktoj de la 31-a Esperantologia Konferenco en la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo 2008*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 125 p. ISBN 978-92-9017-120-1.

Enhavo

<i>Detlev Blanke</i>	Antaŭrimarkoj
<i>Humphrey Tonkin</i>	Malferme: Esperantologio – La vojo antaŭen
<i>Probal Dasgupta</i>	Esperanto kiel laborilo en la interleksika komparado
<i>Nino Vessella</i>	Esperanto kompare kun la sŭahila lingvo
<i>Věra Barandovská-Frank</i>	La korelativoj en Esperanto kaj en kelkaj hindeŭropaj lingvoj
<i>Detlev Blanke</i>	Vortfarado en la germana kaj Esperanto – kelkaj komparoj
<i>Ziko van Dijk</i>	Esperanto kaj aliaj malfortaj lingvoj en Vikipedio
<i>Zlatko Tišljarić</i>	Komparo inter soci-identeca rolo de la serbokroata lingvo kaj de Esperanto
<i>Aleksandro S. Melnikov</i>	Lingvistikaj premisoj por lingvokreumado spegule de luda komunikado kaj vortludoj en la rusa lingvo kaj Esperanto
<i>Davide Astori</i>	Kies lingvo estas Esperanto?

Aŭtoroj

5 Aktoj de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)*

5.1 La aktoj de la 20-a konferenco de GIL 2010

La 20-a konferenco de la germana organizaĵo *Gesellschaft für Interlinguistik* (GIL, Societo pri interlingvistiko) en 2010 traktis la ĉeftemon „Lingvo-inventado kaj ties celoj“. Jen la aktoj kun la kontribuoj:

Fiedler, Sabine (2011, Red.): *Spracherfindung und ihre Ziele. Beiträge der 20. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 26.-28. November 2010 in Berlin*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 18. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 155 p.

Enhavo

Sabine Fiedler

Vorwort (Antaŭparolo)

Sabine Fiedler

Literarische Spracherfindungen aus interlinguistischer Sicht: die englischsprachigen Autoren J. Swift, G. Orwell und J.R.R. Tolkien und ihre fiktionalen Sprachen (Lingvo-inventaĵoj en la literaturo laŭ interlingvistika vidpunkto: la anglalingvaj aŭtoroj J. Swift, G. Orwell kaj J.R.R. Tolkien kaj iliaj fikciaj lingvoj)

Věra Barandovská-Frank

Spracherfindung und Nationalsprache: das Beispiel El Glheḥ Talossan (Lingvo-inventado kaj nacia lingvo: la ekzemplo de El Glheḥ Talossan)

Marek Blahuš

Toki Pona – eine minimalistische Plansprache (Toki Pona – minimumeca planlingvo)

Claus Killing-Günkel

Cliiuy – wie ich eine Sprache erfand (Cliiuy – kiel mi inventis lingvon)

Wim Jansen

Wenn grammatische Transparenz ein Ziel des Esperanto war ... (Se gramatika travidebleco estis celo de Esperanto...)

Katarína Nosková

Das Valenzmodell des Verbs aus kontrastiver Sicht in der deutschen und slowakischen Sprache sowie im Esperanto (La valento-modelo de verbo laŭ kontrastiva vidpunkto en la germana kaj slovaka lingvoj kaj en Esperanto)

Seán Ó Riain

Plattform der Zivilgesellschaft zur Förderung der Mehrsprachigkeit – eine Gelegenheit für mehr Sprachgerechtigkeit? (La platformo de la civitana socio por progresigi multlingvecon – ŝanco por pli da lingva justeco?)

Zsófia Kóródy / Peter Zilvar

Die Bibliothek des Interkulturellen Zentrums in Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt (La biblioteko de la Interkultura Centro en Herzberg/Harcmontaro – la Esperanto-urbo)

Detlev Blanke

20 Jahre Gesellschaft für Interlinguistik e.V. – Ergebnisse und Probleme (20 jaroj
Societo pri Interlingvistiko – rezultoj kaj problemoj)

Sabine Fiedler

Neuere Fachliteratur zu interlinguistischen Themen (2010/2011) (Nova fakliteraturo pri
interlingvistikikaj temoj 2010/2011).

5.2 La aktoj de la 21-a konferenco de GIL 2011

La 21-a konferenco de GIL en 2011 traktis la ĉeftemon „Faka komunikado – interlingvistikaj aspektoj“. Jen la aktoj:

Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2012, Red.): *Fachkommunikation – interlinguistische Aspekte. Beiträge der 21. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 18. – 20. November 2011 in Berlin*. Interlinguistische Informationen, Beiheft 19. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 161 p.

Enhavo

Sabine Fiedler / Cyril Brosch

Einleitung (Enkonduko)

Detlev Blanke / Wera Blanke

Fachsprachliche Kommunikation in Esperanto (Faklingva komunikado en Esperanto)

Mélanie Maradan

ISO/TC 37 – Probleme der Terminologienormung (ISO/TC 37 – problemoj de la terminologia normigado)

Sabine Fiedler

Zur Kulturspezifik der Wissenschaftskommunikation (Pri la kulturspecifeco de la scienca komunikado)

Rudolf-Josef Fischer

Globisch – ein neues Reduktionsmodell des Englischen (Globisch – nova modelo de reduktita angla)

Mélanie Maradan

Blissymbolics – Von einer Pasigraphie zum System für die unterstützte Kommunikation (Blissymbolics – De pazigrafio al sistemo de subtenata komunikado)

Velimir Piškorec

Terminologische und onomasiologische Aspekte des Spelin (terminologiaj kaj onomaziologiaj aspektoj de Spelin)

Roland Schnell

Organisiert die Welt – Der Nobelpreisträger Alfred Hermann Fried als Pazifist und Esperantist (Organizu la mondon – La nobelpremiito Alfred Hermann Fried kiel pacifisto kaj esperantisto)

Věra Barandovská-Frank
Vicipaedia Latina

Till Dahlenburg
Reizvolle Stilfiguren in der Esperanto-Literatur (Ĉarmaj stilfiguroj en la Esperanto-literaturo)

Věra Barandovská-Frank
Konferenzbericht über Conlangs (Konferencraporto pri Conlangs)

Sabine Fiedler
Interlinguistisch relevante Fachliteratur 2011 (Interlingvistike grava fakliteraturo 2011)

Ĉiuj ĝis nun aperintaj 19 aktoj de GIL-konferencoj estas ankoraŭ mendeblaj ĉe la libro-servo de UEA (<http://www.uea.org>), krome ĉe d-ro Wolfgang Schwanzer (www.esperanto-buchversand.de) aŭ rekte ĉe la redaktoro de IpI (detlev@blanke-info.de).

6 Novaj libroj

6.1 En la germana – la 14-a traduko de la Zamenhofstrato

Dobrzyński, Roman (2012): *Die Zamenhofstrasse*. El Esperanto en la germanan tradukis Michael J. Scherm. Münster: Agenda-Verlag, 326 p. Taschenbuch, 19,95 EUR, ISBN 3-89688-485-9.

La libro enhavas multajn interparolojn inter *Roman Dobrzyński* kaj *Louis Christophe Zaleski-Zamenhof* (nask. 1925), la nepo de la iniciatinto de Esperanto. La interparoloj jetas originalan lumon al la estiĝo de Esperanto kaj al la historio kaj perspektivo de la lingvo.

Roman Dobrzyński, nask. 1937 en Varsovio, studis juron kaj ĵurnalismon. Por la pola TV-stacio Kanal 1 li produktis multajn dokumentajn filmojn, aparte pri Suda Ameriko, sed ankaŭ pri Esperanto. La tradukinto *Michael J. Scherm*, nask. 1945 en Karlshuld, estis instruisto en ĝeneralkleriga lernejo, kie li instruis juron, ekonomikon, geografion kaj etikon.

Laŭ la esperanta originalo de Zamenhofstrato (kun du eldonoj) aperis tradukoj en la pola, litova, japana, portugala, ĉeĥa, slovaka, slovena, kroata, hungara, estona, franca, itala kaj germana.

Pretaj por eldono estas tradukoj en la rusa, nederlanda kaj hispana.

Aktuale oni laboras super tradukoj en la ukrainan, latvan, korean kaj vjetnaman

6.2 Max Hans-Jürgen Mattusch pri la multlingveco kaj ties estonteco

Mattusch, Max Hans-Jürgen (2012): Unsere Sprachenwelt und ihre Zukunft. (Natürlicher und künstlicher Sprachwandel. Sprachenvielfalt und Weltsprachen. Fachsprachliche Kommunikation). Norderstedt: Books on Demand (BoD), 268 p., ISBN 978-3-848218-69-1.

La germana aŭtoro ankaŭ tuŝas la mondan lingvo-problemon kaj Esperanton.

6.3 Pri lingvo-inventado (*Stephen Rogers, Michael Adams*)

Pri la temo de lingvo-inventado ni jam menciis kelkajn aranĝojn kaj publikaĵojn en IpI, n-ro 71, p. 27-30. Ankaŭ dum la 20-a konferenco de „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (Societo pri interlingvistiko) en Berlin, en 2010, diversprelege oni traktis la temon. (Vidu 5.1, p.13, en ĉi-tiu kajero))

Sekvas du novaj publikaĵoj:

Rogers, Stephen D. (2011): A Dictionary of Made-up Languages. From Adûnaic to Elvish, Zaum to Klingon – The Anwa (Real) Origins of Invented Lexicons. Avon (Mass.): Adams media, 293 p., ISBN 978-1-4405-2817-0.

Adams, Michael (2011): From Elvish to Klingon. Exploring Invented Languages. Oxford: University Press, 294 p., ISBN 978-0-19-280709-0.

6.4 En „Planet Word“ de *John Paul Davidson* pri planlingvoj

Davidson, John Paul (2011): Planet Word. (With a foreword by Stephen Fry). Camberwell (Victoria/Australien): Michael Joseph, an imprint of Penguin Books,. 445 p., ISBN 978-0-718-15774-6.

Sur p.135-150 oni trovas jenajn ĉapitrojn: ‚Esperanto: language and Utopia‘, ‚Globish: a Language to Do Business With‘, ‚A Klingon Hamlet‘.

6.5 Premiitaj eseoj pri Esperanto-Literaturo (*M. Lipari / H. Tonkin*)

En 1976 oni enkadrigis en la Belartajn Konkursojn la branĉon „Eseo“. Elekton el la premiitaj eseoj prezentas jena publikaĵo:

Lipari, Michela / Tonkin, Humphrey (2012, Red.): Pri homoj kaj verkoj. Eseoj pri la Esperanto-kulturo. (Kun postparolo de Nicola Minnaja). Rotterdam: Universala Esperanto-asocio, 141 p., ISBN 978-92-9017-116-4.

Enhavo:

<i>Humphrey Tonkin</i>	Enkonduko: Literaturo kaj interliteraturo
<i>Eva Tófalvy</i>	Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: la verkisto
<i>Lena Karpunina.</i>	Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn: kelkaj pensoj pri Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj
<i>Carmel Mallia</i>	La Vojo
<i>Krys Ungar</i>	Ĝoje sonu mia kanto: la vivo kaj verkoj de Marie Hankel
<i>Sten Johansson</i>	Kiel legi - ĉu legi - Stellan Engholm?
<i>Eva Tófalvy</i>	La du testamentoj de Sándor Szathmári
<i>Gonçalo Neves</i>	La lirika itinero de Miguel Fernández

Sten Johansson Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová

Alberto García Fumero Arkaika parolado en Esperanto

Jukka Pietiläinen La kvara periodo en Esperanta literaturo

Geoffrey Sutton Pri la periodoj de la Esperanta literaturo

Nicola Minnaja Postparolo

Pri la aŭtoroj

6.6 En festlibroj: Kontribuoj de Johannes Klare kaj Nikolaos Trunte

Festlibroj ekster la interlingvistika medio, dediĉitaj al gravaj sciencistoj okaze de iliaj jubileoj pli kaj pli ofte enhavas eseojn pri interlingvistikaj temoj (ĉefe pri Esperanto).

Nekompletan superrigardon pri la temo oni trovas en:

Blanke, Detlev (2011): “Festlibroj – nova fakliteratura ĝenro en Esperanto – kun aparta konsidero pri la festlibro por Humphrey Tonkin”. En: Nosková, Katarína / Baláž, Peter (2011, Red.): *Modernaj teknologioj por Esperanto. Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2010)*, Partizánske: ESPERO [323 p.], p. 170-183.

6.6.1 Antaŭ nelonge aperis la teksto “Esperanto – eine Minderheitensprache?” de la germana romanisto *prof. Johannes Klare* (Humboldt-Universitato en Berlin). Ĝi aperis en la cifereca festlibro por la germana romanisto *Prof. Dr. Dieter Kattenbusch*:

(Das) diskrete Tatenbuch. Digitale Festschrift für Dieter Kattenbusch zum 60. Geburtstag, herausgegeben von Carola Köhler und Fabio Tosques. Berlin: Institut für Romanistik der Humboldt-Universität zu Berlin, 2012.

La tesktoj en la elektronika festlibro estas troveblaj en la reto kaj printeblaj:

<http://www2.hu-berlin.de/festschrift-kattenbusch/start.html>

6.6.2 En la festlibro por la slavisto *Helmut Keipert* (Universitato Bonn) aperis tre ampleksa eseo de *Nikolaos H. Trunte*⁴:

Trunte, Nikolaos H. (2012): „Muss man als Slavist Esperanto lernen? oder Gibt es eine Slavia Esperantica?“ En: *Irina Podtergera (Red.), Schnittpunkt Slavistik. Ost und West im wissenschaftlichen Dialog. Festgabe für Helmut Keipert zum 70. Geburtstag. Teil 1: Slavistik im Dialog – einst und jetzt*. Bonn: University Press bei V&R unipress [1317 p.], p. 257-283 (ISBN 978-3-89971-972-7), 175 €.

⁴ Nikolaos Trunte publikigis ankaŭ aliloke tre ampleksan interesan tekston:

Trunte, Nikolaos H. (2012): „Slavia Latina und Esperanto“. En: Trunte, Nikolaos H., *Slavia Latina. Eine Einführung in die Geschichte der slavischen Sprachen und Kulturen Ostmitteleuropas*. (Slavistische Beiträge. Hrsg. von Peter Rehder, Band 482 [Studienhilfen Band 17]). München-Berlin: Otto Sagner [787 p.], p. 711-742. (Pri Trunte vidu: <http://nikolaos-trunte.de/>).

6.7 Pri Esperanto-literaturo en *Metzler Lexikon Avantgarde*

En la artikolo ‚Esperanto‘ aperis tute interesa teksto pri „avangardista literaturo en Esperanto“, p. 88-89.

Metzler Lexikon Avantgarde. Hrsg. von Hubert van den Berg/ Walter Fähnders. Stuttgart-Weimar: Metzler, 2009.

6.8 Evoluigi la komprenon pri lingvoj per *Springboard to Languages* (Angela Tellier)

Ekde 2006 oni instruas en kelkaj elementaj lernejoj de Britio la bazojn de Esperanto. La celo estas interesigi la lernantojn entute pri fremdaj lingvoj pere de klare strukturita kaj eŭropstila lingvo. Unuajn rezultojn prezentas publikaĵo de la iniciatinto *Angela Tellier* kaj la docentino *Karen Roehr* (University of Essex):

Tellier, Angela (2012, Red.): *Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school*. Stoke-on-Trent Esperanto UK, 77 p., ISBN 978-0-902756-33-5

La libro estas ricevebla en la libroservoj.

Pri Springboard to Languages vidu: <http://www.springboard2languages.org/home.htm>

6.9 *Probal Daŝgupta*: Esperanto kiel interleksika glosilo

La lingvisto Probal Daŝgupta nomas sian aliron al lingvoj „substancisma perspektivo“. En sia plej nova libro (se mi bone komprenis-DB) li prezentas la ideon, ke la vortfare ege elasta Esperanto povus servi kiel semantika transskribilo por aliaj lingvoj, almenaŭ por la leksiko:

Dasgupta, Probal (2011): *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo*. New York: Mondial, 242 p. ISBN 978-1-59569-214-6.

6.10 *Federico Gobbo* kaj *Marco Benini* pri konstruiva lingvistiko

Gobbo, Federico / Benini, Marco (2011): *Constructive Adpositional Grammars: Foundations of Constructive Linguistics*. Newcastle: Cambridge Scholars Publishing, 978-1-4438-3007-2, 300 p.

La aŭtoro informas:

La volumo de Gobbo-Benini (2011) pri la fundamentoj de konstruiva gramatiko prezentas la adpoziciajn gramatikojn en la plej ellaborita formo, t.e. en terminoj de konstruiva gramatiko, speciale topos-teoria. Ĉi tiu rezulto estas la eliro de esplor-laborado daŭre diversajn jarojn ekde la gramatikoj proponitaj de Pennacchietti kaj formaligitaj en la doktora disertacio de Gobbo (2009). La kerno de la konstruiva formo de la adpoziciaj gramatikoj reprenas la klasifikon de gramatikaj karakteroj fare de Tesnière (1959) pruntita de la esperanta gramatiko. Adpoziciajn gramatikojn oni povas uzi por komputikaj celoj (peraŭtomata tekstprilaborado) kaj lingvolernado, speciale por la traktado de interlingvaj surmetoj kiam oni lernas duan lingvon. La volumo aĉetblas rekte per la eldoneja retejo, Cambridge Scholars Publishing (c-s-p.org), kaj krome per diversaj retejoj de Amazon (usona, brita, franca, germana). Pliaj informoj anglalingvaj ĉi-tie:

<http://www.c-s-p.org/Flyers/Constructive-Adpositional-Grammars--Foundations-of-Constructive-Linguistics1-4438-3007-0.htm>

6.11 Wiki-libroj pri interlingvistiko kaj Esperanto – stranga mikso

Ekzistas „eldonejoj“ kiuj kompilas librojn el materialoj troveblaj en la diverslingvaj vikipedioj. Tute hazarde ĉe Amazon la redaktoro trovis la kvar subajn titolojn. La unua kaj la kvara estas plene germanlingvaj, la du aliaj en la angla. Ne videblas, kiu redaktis la materialojn, ĉu kaj kiam oni aktualigis ilin. Ankaŭ ne klaras la kriterioj de la elekto:

6.11.1 *Interlinguistik. Books LLC®, Wiki Series, Memphis, USA, 2011.*

ISBN: 9781159070052. www.booksllc.net.

Copyright: <http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.de>, 56 S. (kun ilustraĵoj kaj fotoj).

Enhavo:

Esperantologie: Akademio de Esperanto, Bibliothek Hector Hodler, Deutsche Esperanto-Bibliothek, Esperantologie, Esperantomuseum, Fundamento de Esperanto, Gaston Waringhien, Plena Ilustrita Vortaro, Pra-Esperanto

Interlinguistik: Alicja Sakaguchi, Detlev Blanke, Eugen Wüster, Gesellschaft für Interlinguistik, Interlinguistik, International Auxiliary Language Association, Plansprache, Sabine Fiedler, Waldemar Rosenberger.

Plansprache: Afrihili, Arcaicam Esperantom, Basic English, Bliss-Symbol, Communicationssprache Esperantid, Esperanto, Globish, Glosa, Idiom Neutral, Ido (Sprache), Intal, Interlingua, Interlingue, Kolonial-Deutsch, Language Construction Kit, Latino sine flexione, Lincos, Lingua Franca Nova, Lingua sistemfrater, Lingwa de Planeta, Liste von Plansprachen, Loglan, Lojban, Mondial (Sprache), Naturalistische Plansprache, Neo (Plansprache), Novial, Nove-Roman, Pasigrafie, Pasingua, Slovianski, Slovio, Solresol, Sona (Plansprache), Spokil, Timerio, Toki Pona, Volapük, Weltdeutsch.

6.11.2 *Translators to Esperanto. Books LLC (American Series), www.booksllc.net, Memphis, TennesseeUSA, 2010, 41 p.*

Enhavo:

Introduction, Baldur Ragnarsson, Detlev Blanke, Franko Luin, Gaston Waringhien, Georges Lagrange, Lidia Zamenhof, Montagu C. Butler, Nadija Hordijenko Andrianova, Nikolai Vladimirovich Nekrasov, Raymond Schwartz, Reto

6.11.3 *Esperanto-Movado en Britio. Books LLC (American Series), www.booksllc.net, Memphis, TennesseeUSA, 2011, 51 p.*

El la enhavo:

- *Britaj Esperanto-Asocioj* (i.a. Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto-Partio de Britio, Esperanto-Asocio de Skotlando, Junularo Esperantista Brita; Londona Esperanto-Klubo).
- *Britaj esperantistoj* (i.a. Albert Goodheir, Anna Löwenstein, Bill Keable, Brian Moon, Douglas B. Gregor, Duncan Charters, Geoffrey Sutton, Harry Holmes, John C. Wells, Ljuba Lapenna, Marjorie Boulton, Montague Christie Butler, Paul Gubbins, Victor Sadler).
- *Esperanto-Movado en Britio* (i.a. Brita Kongreso de Esperanto, Esperanto-movado en Britio, Esperanto-movado en Skotio, IJL 1947, 1961, 1971, 1984).

6.11.4 *Esperanto. Books LLC (American Series), www.booksllc.net, Memphis, TennesseeUSA, 2011, 29 p. (germanlingva broŝuro)*

El la enhavo:

Bona Espero, E@I, Esperanto, Esperanto-Rechtschreibung, Esperanto-Weltkongress, Geschichte des Esperanto, Herzberg am Harz, Kritik des Esperanto, Lernu!, Pasporta Servo, Prager Manifest, Terminologia Esperanto-Centro, Vivo de Zamenhof).

7 Multilingual Europe – Multilingual Europeans (László Marác/Mireille Rosello)

Marác, László / Rosello, Mireille (2012, Hrsg.): *Multilingual Europe, Multilingual Europeans*. European Studies, Vo. 29. Amsterdam-New York: Rodopi, 323 p., ISBN 978-90-420-3528-7.

Enhavo:

Authors in this volume

Mireille Rosello

Introduction

PART I

Multilingualism in Europe: Policy and Practice

László Marác

Multilingualism in Europe: Policy and Practice

Yvo Volman

The Lisbon Treaty and Linguistic Diversity: Policy and Practice in the European Institutions

Galina Korshunova and László Marác

Multilingualism and Transnational Communication Strategies in Europe: From Habsburg to the European Union

Vanja Ivanova

Language Policy and National Equality in socialist Yugoslavia (1945-1974)

Glyn Williams and Gruffud Owain Williams

Union and Unity out of Diversity

Balázs Vizi

Minority Languages and Multilingualism in Europe and in the European Union

Timofey Agarin and Michael Hornsby

Language Sectarianism: Regional Languages Between the National Past and a European Future

Eva Vetter

Teachers of Italian, Spanish and French: Limitations and Possibilities of their Education towards multilingualism

PART II

Plurilingual Europeans in a Multilingual Europe: Incomplete and Imperfect Communication Tactics

Mireille Rosello

Plurilingual Europeans in a Multilingual Europe: Incomplete and Imperfect Communication Tactics

Guido Snel

Lingua franca in Central Europe after the Disappearance of German

Jean-Marc Moura

French within Europe and Beyond: The Case of 'Francophone' Writers

Dominic Thomas

Into the Jungle: Migration and Grammar in the New Europe

Mary Gallagher

Multilingual Europeans, Contemporary Ireland and John Carney's film *Once*

Mireille Rosello

French-Romani Dialogues in *Gadjo Dilo*: Who Teaches European Languages and Minority Cultures?

8 ESF investas en la retaj sukcesoj de Esperanto

*Kiam, antaŭ pli ol jardeko la usona fondaĵo Esperanto Studies Foundation (ESF) entreprenis la unuajn paŝojn por krei la retejojn **edukado.net** kaj **lernu.net**, la fondaĵo nur malprecize antaŭvidis la eksplodan disvolviĝon de la “socia reto” tutmonde. Nuntempe komencas vidiĝi la fruktoj de tiuj fruaj vizioj.*

Intertempe, la reta revolucio kontribuis al ĝenerala plifortigo de la pozicio de Esperanto inter la lingvoj de la mondo. Tion plej laste signalis la aldono de Esperanto kiel **64-a lingvo uzata de la Google-tradukejo**. En tiu atingo, kiel en pluraj aliaj, la agado de ESF rolis signife. Per longdaŭra investado en la laboro de talentaj volontuloj kaj profesiuloj, la fondaĵo helpas peli la retan agadon per Esperanto al novaj amplekso kaj kvalito.

El ĉiuj ret-komunumaj projektoj ĝis nun, du aparte elstaras kaj havas grandegan potencialon: **lernu!** (kun ĉ. 115 mil registritaj uzantoj) kaj **Wikipedio** (kun pli ol 160 mil artikoloj). ESF nuntempe financas grandskalan renovigon kaj ampleksigon de lernu!, cele al ĝia modernigo kaj transformado al multflanka komunumo de Esperanto-uzantoj. Flanke de Vikipedio, ESF subvenciis la sistemon **WikiTrans** (kreitan de lingvisto *Eckhard Bick*, Danio), kiu kapablas provizi krudan Esperantan tradukon de la tuta anglalingva Vikipedio en deko da tagoj. Post la necesa homa redaktado, tiuj tekstoj povas enorme riĉigi kaj altigi la pozicion de Esperanto en Vikipedio, kie ĝi jam troviĝas en la «dua rango» de lingvoj – tiuj kun pli ol 100 mil artikoloj.

Google ne publikigis detalojn pri la paralela tekstaro, kiun ĝi uzis kiel bazon de la Esperanto-modulo en sia tradukejo. Tamen estus mirinde, se ĝi ne utiligus interalie la ampleksajn paralelajn tekstojn kreitajn kadre de tiuj du grandaj retaj projektoj.

La ĉi-suba kolekto de interesaj faktoj pri *lernu!* kaj *WikiTrans* montras la kreskantan gravecon de la reta agado de ESF, al kiu povas kontribui ĉiu kunlaboremulo – ekzemple, per verko, reviziado aŭ traduko de artikoloj por Vikipedio (eventuale uzante WikiTrans kiel bazon), per aliĝo al ŝatantoj de *Lernu!* en Facebook - www.facebook.com/lernu.net, per socia informado, volontulado aŭ per donaco al la kampanjo “100.000 EŬR por ESF”, lanĉitan de *lernu!* kaj E@I: <http://kampanjo.ikso.net>

Lernu.net:

- pli ol 218 milionoj da vizititaj paĝoj ekde 2004
- ĉ. 115 mil registritaj uzantoj de *lernu!* loĝantaj en 218 landoj kaj teritorioj
- pli ol mil «ŝatoj» en unu tago post dissendo de la invita mesaĝo al *lernu!*-komunumo aliĝi al la oficiala Facebook-paĝo. Kun nun ĉ. 4 mil ŝatantoj, *lernu!* jam atingas pli ol unu milionon da homoj (t.e. «amikoj de ŝatanto»)
- Usono estas la lando kun la plej granda nombro de vizitoj (pli ol miliono ekde 2005) kaj de registritaj uzantoj (pli ol 15 mil)
- Brazilo estas en la dua loko post Usono kaj laŭ la kvanto de vizitoj (ĉ. 800 mil ekde 2005) kaj registritaj uzantoj (pli ol 10 mil)

- Sur la tria, kvara kaj kvina loko laŭ la kvanto daa vizitoj estas Francio, Germanio kaj Pollando, dum tiujn lokojn tenas Hungario, Ĉinio kaj Germanio laŭ la nombro de registritaj uzantoj.
- Ĉinio kaj Sud-Ameriko (pli signife, Kolombio) montras signojn de tre bona kresko (en kelkaj regionoj, pli ol 100% en la lastaj tri monatoj kompare kun la sama tempo pasintjare)

WikiTrans (eo.wikipedia.org/wiki/WikiTrans):

- WikiTrans uzas ĉ. unu gigabajton da vortoj en sia datumbazo
- Jam en aŭgusto 2010 WikiTrans disponigis en la reto 1,5 milionojn da artikoloj el Vikipedio
- Pli ol 3 milionoj da artikoloj de la anglalingva Vikipedio povas esti tradukitaj ene de 10 tagoj (t.e. ĉ. 17 mil artikoloj tage)
- WikiTrans regule retradukas artikolojn por «kapti» la ŝanĝojn kaj modifojn por esti daŭre aktuala
- Kiam vi serĉas artikolon, por kiu ekzistas anglalingva artikolo, sed ankoraŭ ne Esperanta, vi povas iri al la paĝo, tradukita de WikiTrans.

9 Leksikografio

9.1 *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto en la reto*

La plej grava Esperanto-Esperanta vortaro nun estas rete konsultebla (laŭ eldono de 2005): <http://vortaro.net/> La laboron faris E@I kaj la studio GAUS.

9.2 *Aliaj vortaroj en la reto*

Krom PIV en la reto troviĝas tuta aro da aliaj vortaroj, kiuj ankaŭ estas konsulteblaj. Ligojn oni trovas ĉe <http://kono.be/vivo/> (ViVo, Vikia Vortaro):

- ReVo (Reta Vortaro)
- Vikipedio
- Majstro
- Komputeko
- Lerne-vortaro

9.3 *La nova Esperanta Bildvortaro*

Surbaze de la 2-eldono de la germana “Bildwörterbuch der deutschen Sprache”, la t.n.. Bilder-Duden, (Mannheim: Bibliographisches Institut 1958) *Rüdiger Eichholz* ellaboris tradukon kaj post jarojn daŭra diskuto kun fakuloj el multaj landoj ĝin publikigis nur en 1988:

Eichholz, Rüdiger (1988): *Esperanta Bildvortaro*. Bailieboro (Ontario, Kanada): esperanto press, 880 S., ISBN 0-919186-32-7.

Antaŭ nelonge aperis komplete nove prilaborita versio de la Bildvortaro laŭ la plej aktuala lasta eldono de la germana Bilder-Duden (Duden. Das Bildwörterbuch. Gegenstände und ihre Benennungen. 6., neu bearbeitete und erweiterte Auflage. Mannheim-Zürich: Dudenverlag, 2005, 889 S., ISBN 978-3-411-04036-0):

Desmet', Petro/ Horvath Jozefo (2012): *Bildvortaro*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 800 p., ISBN 978-9077066-48.

Komentoj/demandoj:

Kvankam la verko certe estas salutinda kaj rezulto de enorma laboro, bedaŭrinde rimarkeblas kelkaj trajtoj de amatoreco:

- 1 Malagrabla tuŝas la kaprico de kelkaj esperantistoj esperantigi siajn familiajn nomojn. Kiu do estas "Petro Desmet'?"
 - 2 En sia magra enkonduko (p.7-9) la aŭtoroj bedaŭrinde ne informas – malsame al Eichholz siatempe – pri la kriterioj, kiujn ili aplikis por formi la esperantlingvajn ekvivalentojn.
 - 3 Eichholz estis germanlingvulo. La aŭtoroj de la nova eldono supozeble ne. Kiom bone kaj fidele ili regas la germanan, por entrepreni tian verkegon? Ĉu germana esperanto-leksikografo reviziis la verkon?
 - 4 La aŭtoroj informas, ke ili transprenis nur kvaronon de la leksiko el la volumo de Eichholz (p. 8), sed ne klarigas, kial ili tiel faris. Tion ankaŭ ne ŝanĝas la afablaj biografiaj notoj pri Eichholz (p.9).
 - 5 Se oni jam transprenis tian vere gigantan laboron, esperantigi la germanan bild-vortaron, kial oni ne ankaŭ povis transpreni la kolorajn tabulojn? (Kiel ankeso troveblas 16 koloraj tabuloj). La prezo de 36 EUR por tia verko vere estas modesta. Por eldono kun koloraj tabuloj oni certe volonte elpezus multe pli.
 - 6 En indekso ni trovas la temojn de la tabuloj. Pro kostoj la eldonejo rezignis pri indekso kun ĉiuj vortoj, kies transpreno tamen estus vere necesa. Tiun liston oni tamen trovas en la reto kiel PDF-dosiero: www.wuala.com/Retbutiko/Bildvortaro (amplekso: 156 p.).
 - 7 Salutindas la rilatigo de la vortaro al la nova eldono de PIV. Ĉu aliajn vortarojn, ekzemple la germanajn de Krause, oni ne utiligis
- Malgraŭ la kritikaj rimarkoj la solide bindita volumo estas grava leksikologia evento.

Detlev Blanke

9.4 Fakvortaro pri biologio en Interlingua kaj la angla

Interlingua havas nur tre limigitan fakan aplikon, kiel montras rigardo en la katalogojn kaj publicaĵojn: (<http://www.interlingua.com/libros/>; www.interlingua.com/lulu).

Pro tio la apero de fakvortaro estas salutinda:

Cleij, Piet (2012): Dictionario de biologia interlingua-anglese. Vantaa (?): Union Mundial pro Interlingua, 240 S., ISBN 978-2-36607-002-6, 15 EUR +Porto.

(Laŭ „panorama in interlingua“, maio-junio 2012, p. 18).

10 Revuoj

10.1 Nova revuo : *Lingvistik*

Nova revuo estas naskiĝanta: *Lingvistik'* . Bonvolu rigardi ĉe:
<http://lingvistik.weebly.com/index.html> .

Kio estas *Lingvistik'*

Lingvistik' (ISSN 1986-4450) estas internacia revuo pri lingvoscienco, fondita en 2011 de aro da fakuloj de malsama deveno, danke al la apogo de la Internacia Universitato de Karlovo (Bulgarujo). La revuo aperas enrete ĉiujare, gastigante lingvistikajn artikolojn verkitajn en ajna monda lingvo, sed nepre akompanatajn de traduko al Esperanto.

Ĝia specialaĵo estas, ke ĝi celas aperigi sciencajn artikolojn pri lingvistiko en la gepatra lingvo de la aŭtoro kaj en Esperanto, tiel ĝi kontribuas al la uzo de “malgrandaj” lingvoj por sciencaj celoj kaj al tutmonda legeblo de la artikoloj en Esperanto. Ĝi estas formale la revuo de la Internacia Universitato de Karlovo, Bulgarujo.

Bonvolu atenti pri la paĝo:

<http://lingvistik.weebly.com/scienca-komitato-kaj-redaktistoj.html>,

kiu montras la tutmondecon de nia entrepreno.

Aparte atentu ankaŭ pri la peto pri artikoloj ĉe:

<http://lingvistik.weebly.com/peto-pri-artikoloj-esperanto.html>.

Ĝi estas peto ankaŭ por vi aŭ por viaj konatoj, kondiĉe ke ili havas la bezonatan scienca nivelon.

10.2 *Scienca Revuo* kun nova koncepto

Post la jardeka sindona laborego de *prof. Rüdiger Sachs*, kiu estis ne nur prezidanto de ISAE, sed ankaŭ redaktis kaj regule aperigis la kajerojn de „Scienca Revuo“, nova teamo klopodas daŭrigi la eldonon de Scienca Revuo“. Red.

La nova redaktoro *Johannes Mueller* i.a. informas:

Estas granda honoro kaj granda defio por mi transpreni la taskon redakti kaj eldoni unu el la plej longdaŭraj revuoj esperantlingvaj. Defio, kiun mi volonte antaŭĝojante akceptas, des pli, ĉar mi povas min konsideri ano de tre bona teamo. Kelkaj aferoj verŝajne ne ŝanĝiĝos, ekzemple daŭre estos kvar eldonoj jare. Ni konservos la altan lingvan kvaliton de la revuo danke al spertaj kontrollegantoj. La plej granda ŝanĝo estas, ke la Scienca Revuo estos havebla pere de reta disvastigado. La kvaronjaraj eldonoj estos haveblaj en la interreto. Fine de ĉiu jaro aperos la jara volumo en papera formo. Tiu jara volumo estos kvazaŭ libro ducentpaĝa. Tion decidis la estraro de ISAE, ĉar vere utilas la reta eldono. La arkivo estos atingebla, kaj la enhavo estas pli facile stokebla kaj kopiebla. Ĉar ni ankaŭ volas konservi la paperan eldonon, ni volas, ke ĝi estu laŭeble plej alloga, kaj akirebla ankaŭ pere de libroservoj. Kelkaj novaj aferoj enkondukiĝos, ekzemple Scienca Revuo havos terminologian sekcion. Tio ĉefe eblas, ĉar ni havas fakulon pri terminologio en nia teamo, nome Mélanie Maradan. La rubriko “Scienco kaj Esperanto” temas pri ajna rilato de scienco kun Esperanto, kiel ekzemple prezento de famaj sciencistoj Esperantistaj, gravaj sciencaj verkoj en Esperanto. Tiu rubriko povas havi aparte gravan signifon por la scienca kaj faka agado en Esperanto, se troviĝos sufiĉe da aŭtoroj...Alia rubriko estos “Scienco kaj socio”. Ĝi okupiĝas pri la influo, kiun scienco havas al la socio kaj inverse...Ankaŭ nesciencistoj sentu sin alvokitaj verki kontribuon por tiu ĉi tradicia revuo...Kiel nova redaktisto de Scienca Revuo mi forte alvokos al ĉiuj verki artikolon. Ne nepre estu ĝi scienca artikolo. Ankaŭ povas esti por unu el la aliaj rubrikoj, kiujn Scienca Revuo ekde nun havos. ...Vi nun trovas la Scienca Revuon en la reto ĉe <http://www.scienca-revuo.info>. Tie vi povas interalie legi artikolojn, proponi novajn artikolojn, kandidatiĝi kiel revizianto aŭ provleganto....Do ni ĝojas pri rimarkigoj pri eraroj.

Ludwigsburg, marto 2012

Johannes Mueller

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .
